

Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2002 numero 1-a: januaro / februaro

Grava kultura kunveno sin pretigas kun la prelega vizito de Renato CORSETTI.

Ĝi okazos la sabaton 15-an de junio
en la biblioteko de La Chaux-de-Fonds
sub la akceptemo de UEA, CDELI, SES kaj KCE.
Nepre rezervu tiun ĉi daton por renkonti la prezidanton de UEA.
Detalaj sciigoj aperos en la du venontaj numeroj de *"SES informas"*

Ankaŭ atentu pri alia signifa renkontiĝo:

La Ĝenerala Kunveno de SES okazos en Luzern la sabaton 6-an de aprilo kadre de la festado de la 75-jara jubileo de Lucerna Esperanto-Societo.

Ankaŭ nepre rezervu tiun ĉi daton en via agendo.
Detalaj sciigoj aperos en la venonta numero de *"SES informas"*

Rememorigilo

SES informas

Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfako 5031,
CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

Retpoŝto: claude.gacond@ne.ch &
gacond@bluewin.ch

☎ ĉe CDELI: 032 967 68 55,
hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29:
indiki: por Claude GACOND

Redakta kunlaboranto:
Richard SCHNELLER.

SES informas

Redaktaj datlimoj por la venontaj numeroj

2002-2: marto-aprilo: februare 15.

2002-3: majo- unua duono de sep-
tembro: marte 15.

2002-4: dua duono de septembro –
oktobro: aŭguste 25.

2002-5: novembro-decembro: okto-
bre 15.

Antaŭdankon al la estroj de la lokaj
kaj fakaj societoj pro la atenta

konsidero, kiun ili alportos al la
koncernaj datoj por la planado de
sia aktiveco.

SES-estraro

Bruno GRAF, prezidanto, Jurastrasse 23,
3063 Ittigen/Bern. ☎: 031 921 44 59. Ret-
poŝto: bgraf.o@bluewin.ch.

Dietrich WEIDMANN, vicprezidanto, PF 301,
8034 Zürich. ☎: 01 251 50 25. Retpoŝto:
info@esperanto.ch.

Nicole MARGOT, sekretario, Chemin des
Lys 4, 1010 Lausanne. ☎: 021 653 14 67.
Retpoŝto: n.margot@bluewin.ch.

Elisabeth LAUPER, kasisto, République 13,
2300 La Chaux-de-Fonds. ☎: 914 39 34.

Retpoŝto: elilauper@bluewin.ch.

Chiara FABBRI, peranto itallingva kaj junul-
ara, Sägenstrasse 8, 7000 Chur. Retpoŝto:
chiara-fp@bluewin.ch.

Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds

Anoncoj

Paĝo	Neesperantistoj & komercaj	Esperantistoj & nekomercaj
1/8	CHF 40	CHF 20
¼	CHF 70	CHF 35
½	CHF 110	CHF 55
1/1	CHF 180	CHF 90

Svisa kalendaro

Januare 2002

- 02: Wil: EKW-renkontiĝo.
07: Lausanne: LES-kunveno.
08: La Chaux-de-Fonds: studrondo.
08: Zürich: ESZ-kunveno.
18: Luzern LES-kunveno
22: La Chaux-de-Fonds: studrondo.
26: La Chaux-de-Fonds: KCE:
Ĝenerala asembleo.
31: Basel: ESB: Ĝenerala kunveno.

Februare

- 04: Lausanne: LES Ĝenerala kunveno.
05: Genève: kunveno de La Stelo.
06: Wil: EKW-kunveno.
09: La Chaux-de-Fonds: CDELI:
Didaktika sabato.
12: La Chaux-de-Fonds: studrondo.
12: Zürich: ESZ: Ĝenerala kunveno.
19: Basel: ESB: Karnavala kunveno.
20: Redakta datlimo por *SES informas*.
28: Basel: ESB: Rakleda kunveno.

Marte

- 04: Lausanne: LES-kunveno.
05: Genève: Ĝenerala jarkunveno de La Stelo.
09-10: Ski-renkontiĝo de JES.
12: La Chaux-de-Fonds: studrondo.
12: Zürich: ESZ-kunveno.
16: La Chaux-de-Fonds: CDELI:
Didaktika sabato.
21: Basel: ESB: Lud-kunveno.
30 – Aprile 04: Vigy ĉe Thionville, FR:
57-a Kongreso de SAT-Amikaro.

Aprile

- 03: Genève: kunveno de La Stelo.

- 06: Luzern: Jarkunveno de SES kaj 75-
jara jubileo de LES.
08: Lausanne: LES-kunveno.
09: Zürich: ESZ-kunveno.
20-21: La Chaux-de-Fonds: KCE:
SAT-Semajnfino.

Maje

- 06: Lausanne: LES-kunveno.
07: Genève: kunveno de La Stelo.
17-20: Husum, Germana Esperanto-
Kongreso.
18-20: Strasbourg: Franca Esperanto-
Kongreso.

Junie

- 01-07: Plovdic, Bulgario: 54-a IFEF-
Kongreso.
04: Genève: kunveno de La Stelo.
07-09: Zürich: ESZ: Semajnfina
seminario kun magiisto TRIKSINI.
15: La Chaux-de-Fonds: CDELI:
Prelego de Renato CORSETTI.

Julie

- 20-26: Leuven (Belgio) Internacia
Esperanto-Konferenco de OSIEK.

Aŭguste

- 03-10: Fortaleza, Brazilo: 87-a
Universala Kongreso de Esperanto.

Septembre

- 21: La Chaux-de-Fonds: CDELI:
Didaktika sabato.

Novembre

- 16: La Chaux-de-Fonds: CDELI:
Didaktika sabato.

Vivo de SES

Ĝenerala Kunveno

La ĝenerala kunveno de SES okazos en Luzern la sabaton 6-an de aprilo kombine al la 75-jara jubileo de la fondo de Lucerna Esperanto-Societo.

Sukcesaj kunvenoj

La Regionaj kultura sabato en La Chaux-de-Fonds kaj semajnfino en Zürich bone sukcesis, ambaŭ kun po dudekkvino da partoprenantoj. Tiurilate vidu la raportojn en la rubrikoj CDELI kaj Esperanto-Societo Zürich.

Al lingva demokratio

Al *lingva demokratio* estas plano por nova kampanjo kaj strategia plano de Universala Esperanto-Asocio ekde 2001. Dum la Universala Kongreso en Zagreb la Komitato de UEA aprobis novan laborplanon kaj ankaŭ mi kiel svisa delegito voĉdonis por ĝia akcepto, kvankam oni povas havi en iuj

punktoj devian vidpunkton el nacia rigardo.

Tiu laborplano estis diskutita en la Strategia Forumo, kiu reprezentas la esperantan komunumon: Esperantion. Impresis min la interveno de brazila reprezentanto, kiu pretendis, ke la batvorto *lingva demokratio* estas la plej forta por UEA. En rilatoj kun politikaj instancoj tio certe veras. En rilatoj kun ekonomiaj establoj ni substreku la enorman ŝparon kaj raciigon en la internacia komunikado, kiun peras rapide lernebla internacia lingvo kiel esperanto. En rilatoj kun individuoj ni akcentu la praktikajn avantaĝojn, pri kiuj esperanto-parolantoj disponas. Kaj en rilato kun lingvuloj ni reliefigu la strukturon de esperanto kaj ĝian kulturon. Nia argumentado konsideru la alparoliton. La nova laborplano emfazas la jenajn agad-kampojn:

Informado:

Tio signifas atingi, ke la informanto kaj la homoj, kiujn oni volas informi, havu ĝustajn ideojn pri esperanto. Tio ofte ne okazas.

Instruado:

Tio signifas atingi, ke lerniloj kaj lern-okazoj estu facile troveblaj kaj allogaj por la celataj homoj. Oni facile neglektas tiun postulon.

Utiligado:

Tio signifas atingi, ke la celataj homoj trovu ion valoran kaj interesan por sia uzado de la lingvo. Nepre principo en enkondukoj kaj en kursoj.

Plijuniĝo:

Tio signifas la motivigon kaj aktivigon de gejunuloj. Pli rapide dirite ol farite.

Tutmondiĝo:

Tio signifas la varbadon kaj aktivigon de anoj en regionoj, kie esperanto ankoraŭ ne trovis radikojn.

Profesiigo:

Tio signifas la varbadon kaj aktivigon de instruistoj, ĵurnalistoj, intelektuloj, ktp. Vera malforto en la svisa movado.

SES kiel movado koncentriĝu unue al la informado kaj varbado, kiu estas antaŭkondiĉo por la instruado kaj utiligado. La penetro de la angla lingvo en la ĉiutaga vivo forpelis ĉe multaj membroj la kuraĝon informi kaj varbi por esperanto. Ni devas rekonvinki nin mem pri la neceso kaj valoroj de la Lingvo Internacia. Tial mi reprenas kelkajn konstatojn el la *Manifesto de*

Prago, julio 1996, kiuj ŝajnas al mi trafaj:

- Depost jarcento la celo de la esperanto-parolantoj ne perdis gravecon kaj aktualecon. Nek la tutmonda uzado de kelkaj naciaj lingvoj, nek progresoj en la komunikad-tekniko, nek la malkovro de novaj metodoj de lingvo-instruado realigos jenajn principojn, kiujn ni konsideras esencaj por justa kaj efika lingva ordo.

- Komunika sistemo, kiu tutrive privilegias iujn homojn, sed postulas de aliaj, ke ili investu jarojn da penoj por atingi gradon de esprim-kapablo, estas fundamente maldemokratia. Nur malgranda procentaĵo el tiuj, kiuj studas fremdan lingvon, ekmastras ĝin. Plena posedo de esperanto eblas ene de jaro.

- La malegala disdivido de potenco inter la lingvoj kondukas al konstanta lingva malsekureco aŭ rekta lingva subpremado ĉe granda parto de la monda loĝantaro. La tutmonda uzado de la angla difektas multajn lingvojn kaj malstabiligas ĉefe la malgrandajn.

- Ĉiu lingvo liberigas kaj mal-liberigas siajn anojn, donante al ili la povon komuniki inter si, barante la komunikadon kun aliaj. Planita kiel universala komunikilo, esperanto estas unu el la grandaj funkciaj projektoj de la homa emancipiĝo – projekto por ebligi al

ĉiu homo partopreni kiel individuo en la homara komunumo.

Renato CORSETTI, la nova prezidanto de UEA, alvokas, ke ni reîgu movado, kiu parolas al la mondo en maniero, kiun la mondo komprenas, kiu instruas la lingvon per modernaj metodoj kaj utiligas esperanton por la normalaj bezonoj de la vivo. Mi aldonas, ke sen forta movado ni ne havos fortan komunumon.

Necesas celi ne nur al pasiva informado (nur al petantoj), sed al aktiva informado, ĉu al la publiko ĝenerala aŭ faka. Ni vidu, kiel aliaj organizaĵoj procedas. Dum la UK en Berlino okazis informaj prezentoj de la amikaro Bruno GRÖNINGS pri spirita kuracado. Mi ne partoprenis manke de intereso kaj tempo. Sed kiam tiu movado anoncis antaŭ nelonge prelegojn en la universitato de Bern, mi scivol-emis kaj ĉeestis. Tiuj prelegoj okazas en kelkaj svisaj urboj. Je mia surprizo la granda aŭlo estis plena, ĉirkaŭ 500 personoj alestis. Fine mi demandis al la organizanto, kiel ili informis. Li diris, ke la financaj rimedoj estas limigitaj, ke la helpantoj laboras honorofice, spite ili metis 60'000 (sesdek mil) flugfoliojn en leterkestojn.

Ĉu la esperantistaro povus fari same? Neniu dubas, ke estas necese fari pli. Ni refariĝu movado. SES disponigas varbilojn por disdoni, ne por konservi en tirkesto. Ni

prezentis kelkajn en la lasta numero de tiu bulteno. Ne ankoraŭ alvenis mendoj, eble ĉar mankas kuraĝo kaj konvinko. Mi alvokas vin, membrojn kaj grupojn, informu regule pri esperanto. Plej simple estas disdoni varbilojn al celita publiko, kiel faris grupo kun Mireille GROSJEAN en la centro de La Chaux-de-Fonds. Ĉiujare unuopuloj disdonu dekojn, grupoj centojn da varbiloj. Vekiĝu kaj ekagu. Kiel diris ZAMENHOF? Ni semu kaj semu konstante.

La prezidanto: Bruno GRAF.

Donacoj

Donacoj en CHF al SES:
Traugott Rinaldo AEBI, , Muri b. Bern: 15; David BUHLMANN, Prilly: 15; Peter ELMER, Zürich: 25; Verena ELSNER, Zürich: 15; Claude kaj Andrée GACOND, La Chaux-de-Fonds: 25; Walter GIANNINI, Zollikerberg: 75 + 50; Moreno GRANEROLI, Origlio: 25; Théo HUBER, Petit-Lancy: 50; Jeannine JEANNERET, Neuchâtel: 25; Alois KOLLER, Zürich: 35; Verena MALLEPELL, Unterehre: 50; Marcel MOREILLON, Genève: 40; Dolores MORISOLI, Monte Carasso: 15; Carla MÜLLER, Luzern: 35; Jimmy RIVIERE, Prilly: 15; Armin WEIDMANN, Uerikon: 15; Bettina ZEHNDER, Brugg: 25; Sume: 550.

Donacoj en CHF por la Agado
2003: Lucienne DOVAT, Renens:
15; Nancy FONTANNAZ, Pully: 40;
Richard SCHNELLER, Kronbühl: 15;
Ruth kaj Bert Joris VAN
PUIJENBROECK, Winterthur: 10.
Sume: 80.

Donacoj en CHF al JES:
Lucienne DOVAT, Renens: 20;
Sume: 20.

Nome de SES la kasistino
Eisabeth LAUPER kaj la redaktoro
Claude GACOND dankas la registri-
tajn donacintojn pro ties malavar-
eco. Ili krome esperas, ke la pagilo
akompananta la nunan bultenon re-
vekos la malavarecon de la legantoj
de "SES informas".

Tutsvisa aktiveco

CDELI

Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la Urbo
Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds
☎ 032 967 68 55.

Fakso: 032 967 68 29, indiki: por CDELI.

Emailoj: CDELLVCH@ne.ch

nancy.fontannaz@ne.ch

claude.gacond@ne.ch

martine.schneller@ne.ch

Venontaj studsabatoj

Februare 9: Didaktiko:

Studotemo: Ekzercoj leksikaj,
gramatikaj kaj stilaj lige al esploro
de beletraj tekstoj. Ekzameno de
materialo nuntempe kunverkata de
Claude GACOND kaj Nancy

FONTANNAZ surbaze de tekstoj de
Karolo PICH.

Marte 16: Didaktiko:

Studotemo: Enprofundiĝo en la
trastudo de la esperanta verbo-
sistemo per aro da helpaj ekzercoj:
pri la rolo de la sufiksoj -ig kaj -iĝ
lige al la verba valenteco (preciza
distingo inter transitiveco kaj ne-
transitiveco), pri la kompleksa rolo
de la participaj sufiksoj, pri la du-
obla rolo de la sufikso -ad, pri la
senpera verbigo de neverbaj vort-
elementoj.

Junie 15: Kultura sabato
kun Renato Corsetti, la
prezidanto de UEA.

Septembre 21: Didaktiko

Novembre 16: Didaktiko.

(Ĉiam studo ekde la 10h00 ĝis la
16h00 kun komuna tagmanĝo)

Novaĵoj de CDELI

Ni lastatempe danke ricevis kaj katalogis la jenajn novajn verkojn:

Aŭtoro(j)	Titolo	Donaco de	Nombro
Kersaudy, Georges	Langues sans frontières-	la eldonisto	1 ekz.
Steiner, Rudolf	Kiel oni akiras ekkonojn...	la tradukisto W. Nüesch	3 ekz.
Steiner, Rudolf	La edukado de la infano...	la tradukisto W. Nüesch	3 ekz.
Steiner, Rudolf	La okultoscienco en konturo	la tradukisto W. Nüesch	3 ekz.
	Studoj pri interlingvistiko	Detlev Blanke	1 ekz.
	Adoru : ekumena diserva libro	Bernhard Eichkorn	1 ekz.
Tezuka, Osamu	La flambirdo (parto Futuro)	Kansaja Ligo	1 ekz.
Soros, Tivadar	Maskerado ĉirkaŭ la morto	UEA	1 ekz.
Polo, Marco	La libro de la mirindaĵoj	UEA	1 ekz.
	Forum Helveticum, kajero 2	SES	1 ekz.
Russell kaj Couturat	Correspondance, 2 vol.	la eldonisto	1 ekz.
	PIF, festkajero Zagreb 87	Claude Piron	1 ekz.
Auld, William	Paŝoj al plena posedo, 3a eld.	Claude Gacond	1 ekz.
Gosciny kaj Uderzo	Asteriks kaj la Normanoj	Claude Gacond	1 ekz.
Gosciny kaj Uderzo	Asteriks kaj Kleopatra	Claude Gacond	1 ekz.
Aĭvanhov, O. M.	Meditado ĉe sunleviĝo	Nancy Fontannaz	3 ekz.
Verne, Jules	San Carlos	Martine Schneller	2 ekz.
Gilbreth, F. kaj E.	Treize à la douzaine	Martine Schneller	1 ekz.
Setälä, Vilho	Esperanta legolibro	H. Hunkeler (postlasaĵo)	1 ekz.
Wingen, W. und H.	Wir lernen Esperanto, 6. Aufl.	H. Hunkeler (postlasaĵo)	1 ekz.
Daudet, Alphonse	Tartarin de Taraskono	H. Hunkeler (postlasaĵo)	1 ekz.
Szczypiorski, Andzej	Sub la nobla ĉevalo	H. Hunkeler (postlasaĵo)	1 ekz.
Grazzini, Corrado	Vocabolario italiano-esperanto	H. Hunkeler (postlasaĵo)	1 ekz.
Tellini, Achille	Vocabolario esperanto-italiano	H. Hunkeler (postlasaĵo)	1 ekz.
Paluzie-Borrell, J.	Diccionario esperanto-español	H. Hunkeler (postlasaĵo)	1 ekz.
Mrabet, Mohammed	La spegulo granda	Tazio Carlevaro	1 ekz.
Skorupski, Jan	CH 8001 ChoCHoLeNiel	la aŭtoro	1 ekz.
Aĭvanhov, O. M.	Feliĉu, eblas!	Nancy Fontannaz	1 ekz.

Ni memorigas, ke:
 unua ekzemplero de libro aŭ dokumento ne povas eliri el la biblioteko,
 dua ekzemplero povas eliri en kelkaj kazoj,
 tria ekzemplero povas eliri laŭ la kutimaj pruntebloj.

Dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacantoj! Ĝis nun la kolektoj de CDELI riĉiĝis nur danke al la donacemo de eldonejoj, redakcioj kaj libroposedantoj.

Cl. GACOND & M. SCHNELLER

Martine SCHNELLER responde al informpetantoj:

1) Kial vi enrigas en la komputilon nur noticojn kaj ne la librojn mem, tiel ke ni povu legi ilin rekte ĉe la ekrano? (S-ro D.R)

Laŭ la nuna stato de la tekniko tio efektive eblus, kaj la tuta CDELI-libraro ne okupus pli da loko, ol ŝu-skatolo!

Cetere jam estas multaj libroj en la interreto. Ankaŭ multaj plendoj pro tio, ke aŭtoroj defendas siajn rajtojn. Momente la ĉefaj problemoj tiurilate do ne estas teknikaj, sed juraj.

Ĉiukaze tio ne estas afero de bibliotekistoj, sed de eldonistoj kaj de... interretaj piratoj.

Aliflanke, mi mem ne atendas senpacience la momenton, kiam paperaj libroj ne plu ekzistos: verdire mi pli ŝatas legi libron en mia lito aŭ en la ombro de amika arbo, ol algluita al komputil-ekrano (sen paroli pri ŝaltiloj, elektro, radiado, ktp.)

Tamen, se – same kiel en la romano "Fahrenheit 451" tiu momento venos, mi informas la svisan esperantistaron, ke mi parkerigos la tutan verkaron de P. G. WODEHOUSE kaj oni do povos veni al mi, por ke mi recitu parton aŭ la tuton!

2) Ĉu la ŝlosilvorto estas cdeli aŭ la kompleta nomo Centro de

Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia? (S-ino ?)

3) La rubriko de la loka bazo, en kiu ni sukcesis menci la nomon cdeli estas koda rubriko kun maksimume 6 literoj; la vorto cdeli kun nur 5 literoj do bonŝance povis taŭgi.

En la noticoj mem la mallongigoj male estas nepermesataj. Tiel vi trovos Universala Esperanto-Asocio kaj ne UEA, Sennacieca Asocio Tutmonda kaj ne SAT, ktp.

3). Ĉu vi jam emeritiĝis aŭ ĉu vi estas salajrita por labori en CDELI? (S-ino ?)

Mi ne ankoraŭ emeritiĝis, ve kaj en ve! Sed koncerne al mia pago pli bone sin turni al s-ro Claude GACOND aŭ s-ino Elisabeth LAUPER: ili scias kaj diligente zorgas pri ĉio. Mi tamen povas diri, ke mi ricevis antaŭpagon la 22-an de novembro (kaj verŝajne ricevos alian antaŭ Kristnasko).

Klarigoj de Claude Gacond: Kiel ni jam raportis, Martine SCHNELLER proponis sian libervolan helplaboron al CDELI por la monatoj majo kaj junio 2001. Tiam ŝi estis ne salajrita.

La direktoro de la Biblioteko, Jacques-André HUMAIR, havis la grandan feliĉon malkovri, ke en la mondo reale ekzistas almenaŭ unu bibliotekistino ne nur reganta esperanton, sed ankaŭ esperantologie klera. Tial li decidis dungi ŝin ekde la 1-a de januaro 2002 por la perkomputila katalogado de la CDELI-libraro, se ŝi kapablos majstri la interbibliotekan RERO-sistemon praktikatan de la romandaj bibliotekoj kaj

de la nacia biblioteko. Kaj li samtempe ankaŭ decidis instaligi la necesan komputilon en la CDELI-salono mem, por ke tiu ĉi laboro povu efektiviĝi surloke.

Per sia fonduso deponita ĉe SES kaj prizorgata de ties kasistino Elisabeth LAUPER, CDELI decidis salajri Martine SCHNELLER ekde la monato julia ĝis fine de decembro, sed malrapidiĝis la pagado de la laborhoroj pro administraj kaŭzoj kun la AVS-kaso, ĉar nek CDELI, nek SES posedas la statuson de laboronanto. Ĉio fine trovis kontentigan solvon ĵus antaŭ la fino de la jaro 2001. Tio signifas, ke Martine SCHNELLER estis salajrita fare de CDELI por duonjara laborperiodo per la fonduso, kiu estas deponita ĉe SES.

Ekde la 1-a de januaro 2002 ŝi ĝuas pri la statuso de bibliotekisto triontempe engaĝita de la biblioteko por dujara periodo cele al perkomputila registro de la libraro kaj dokumentaro de CDELI, funkcio renovigebla post du jaroj, se esprimiĝos librokonsultemo fare de praktikantoj de esperanto kaj de interesatoj pri interlingvistiko.

Nome de CDELI kaj tutcerte ankaŭ de la esperantistaro mem ni esprimas al Martine SCHNELLER kun viglo nian bondeziron komence de la jaro 2002-a. Laborĝojon ŝi daŭre trovu en sia funkcio tutcerte utila. Ni ne forgesos, ke estas danke al ŝia bonvola helpo dumonata, ke CDELI mem akiris pli firman pozicion en la biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds.

Kaj jen demando de Martine SCHNELLER:

Pseŭdonimoj estas oftaj en esperantio. Ĉu iu scias, kiu sin kaŝas malantaŭ la pseŭdonimo ETULO? Respondo al CDELI bonvenas. Antaŭdankon!

Sukcesa kultura sabato

Kun la akompano de agrable suna vetero la regiona SES-CDELI-kultura sabato de la 17-a de novembro grupigis 25 partoprenantojn el Romandio kaj Germanio. Kiel diris Bruno GRAF enkonduke kaj konklude, la studotemaro bone akordiĝis kun la eŭropa jaro de la lingvoj.

Unue formiĝis du paralelaj grupoj por faciligi al Martine SCHNELLER demonstradon pri la perreta konsulteblo de la kolektoj de CDELI. Dum dekduo da interesatoj ĉirkaŭis ŝian komputilon en la salono Edmond PRIVAT, Claude GACOND ekzamenis la nunan lingvan situacion kun alia dekduo da ĉeestantoj en la salono Charles HUMBERT, kaj inverse. La ĉisupraj respondoj de Martine SCHNELLER al demandantoj estas fakte daŭrigo de ŝiaj klarigoj.

Claude GACOND atentigis, ke Lejzer ZAMENHOF karakterizis sian planlingvan projekton helpe de la neologismo "*internacia*", kiu en 1887 signifis "*intergenta*". Etime la vorto "*nacio*" devenas el "*natif*" [*nask*]. Sed jam komence de la 20-a jarcento la nocio "*nacio*" perdis sian originan signifon por pli kaj pli vikle sinonimi al la nocio "*ŝtato*", tiel ke hodiaŭ "*internacia*" sinonimas al "*interŝtata*" aŭ "*interregistara*" Tial en la tridekaj jaroj

de la pasinta jarcento naskiĝis la nova vorto "etno" por iel redoni la realan signifon de "nacio". Zamenhof lanĉis fakte lingvon "interetnan" kaj ne "internacian" laŭ la nuna signifo de tiu adjektivo, lingvon ebligantan rilatojn inter la etnoj laŭ neŭtrale homa sinteno. Kontraŭe la franca komence de la dudeka jarcento kaj nun la angla komence de la dudekunua estas "internaciaj" aŭ "interregistaraj" lingvoj neniel demokrataj kaj respektemaj al la etnoj. Ili estas "glotofagaj" aŭ "lingvovoraj", dum esperanto respektemas al ĉiuj etnaj lingvoj. Du kontraŭj humanismaj orientiĝoj.

Kiam ree ĉiuj kunestis en la salono Charles HUMBERT, Mireille GROSJEAN tre interese raportis pri la interrompanĉa planlingvo Rumantsch Grischun, kiu ne celas esti reale parolata, sed ĉefe skriblingvo. Oni troviĝas antaŭ situacio certe influata de la alemana sinteno. La alemanoj uzas la germanan kiel skriblingvon, sed parole fidelas al la propra idiomo. Samas la sinteno de la rumanĉoj. Por ili la interrompanĉa ne venas ĉesigi la parolan uzon de la loka lingvo.

Post la komuna tagmanĝo Mireille GROSJEAN respondis al la demandoj de la interesata publiko, kaj poste Jean-Thierry VON BÜREN estis ne nur intervjuata de Claude

GACOND koncerne al sia poligloteco, sed ankaŭ de multaj ĉeestantoj. Fakte esperanto estas pli malpli la 15-a lingvo, kiun li regas. Same kiel Mireille GROSJEAN, kiu ankaŭ regas plurajn idiomojn, li komprenigis, ke por ili ĉiu lingvo posedas propran personecon kaj ebligas realan kontakton kun la vizitata lando. Ni certe havos la okazon foje franclingve intervjui lin cele al artikolo, kiu atestos, ke esperanto neniel minacas la aliajn lingvoj. Ĉe Jean-Thierry VON BÜREN kaj Mireille GROSJEAN la esperanto-praktiko alportis novan dimension al ilia lingva esploro, kiu restis ege aktiva.

Claude GACOND

ILEI

Svisa Sekcio

Mireille Grosjean
CP, 2416 Les Brenets.

Edukado pacen

Esperantistoj en Argentino, kiuj deziris prezenti al nacia kongreso studprogramon cele al edukado pacen kaj al instruado de esperanto, petis al Atillio ORELLANA ROJAS verki pri tiu koncepto. Tiu ĉi rilatis kun sia svisa kolegino Mireille GROSJEAN,

kiu verkis por li tiucele 4-paĝan dokumenton nun ankaŭ legeblan sur la hejmpaĝo www.asepaix.ch de la svisa organizaĵo pedagogia "Association suisse des Educateurs à la Paix" La enirvorto por ĝia konsulto estas: "Curriculum".

En esperanto la teksto de tiu kontribuo "Edukado pacen" estas en posedo de Mauro LA TORRE, prezidanto de ILEI, kiu zorgos pri ĝia aperigo en "Internacia Pedagogia Revuo", kaj/aŭ sur la hejmpaĝo de ILEI.

Ambaŭ versioj de tiu dokumento estas ankaŭ rekte haveblaj ĉe Mireille GROSJEAN mem, laŭ la ĉi-supre indikita adreso.

JES

Junularo Esperantista Svislanda
Jeunesse Espérantiste Suisse
Junge Esperantisten der Schweiz
Gioventù Esperantista Svizzera
Giuventetga Esperantista Svizzer

c/o Vera POCHANKE

Zurlindenstrasse 110, 8003 Zürich

Telefon-numeroj:

hejma: +41.(0)1.451.16.51

oficeja: +41.(0)1.255.25.37

lab: +41.(0)1.255.37.87

mobike: +41.(0)79.431.53.30

veronika_p@hotmail.com

Nova komitato

Benno FRAUCHIGER, prezidanto
Olivier AMREIN, vic-prezidanto
Vera POCHANKE, sekretariino
Celestina KUHL, kasistino
Joëlle GROSJEAN, komitatano.

Specimeno de la bulteno de JES akompanas "SES informas", alportante pliajn sciigojn.

Kien meti la svisan flagon?

Inter la 29-a de julio kaj la 5-a de aŭgusto preskaŭ 300 IJK-anoj vizitis la eŭropan parlamentojn. La paroloj de la franclingva gvidantino estis profesie tradukitaj en esperanton. Ni do eksciis multajn aferojn pri la eŭropa parlamento, ties ejo, kaj Eŭropa Unio mem. La gvidantino ankaŭ klarigis al ni la oficialan sinsekvon de la landaj flagoj. Ili estu ordigitaj alfabetvice laŭ la nacilingva nomo de ĉiu lando. Pripensante tion, mi demandas min, kien meti la svisan flagon? Ĉu laŭ la germana nomo "Schweiz" antaŭ Slovenio ("Slovénija", kiu tre verŝajne aliĝos pli frue ol Svislando), ĉu laŭ la franca nomo "Suisse" inter Slovenio kaj Finnlando ("Suomi"), aŭ ĉu laŭ la itala nomo "Svizzera" post Svedio ("Svenska")? Ŝajnas, ke la lingvaj problemoj de Eŭropa Unio estos ankoraŭ pli gravaj, ol iam antaŭvidite!

Benno FRAUCHIGER, JES, Bazelo

KCE

Kultura Centro Esperantista
Strato Postiers 27, Poŝtako 311
2301 La Chaux-de-Fonds.
☎ kaj fakso: (032) 926 74 07.
kce.esperanto@bluewin.ch

Kunvenoj

Januare 26: Ĝenerala Asembleo.

Aprile 20-21: SAT-Semajnfino kun la temo *Kia rolo por la maldetro en la nuna esperantio?*

Raporto

La novembra kultura monatfino estis dediĉita al tri etapoj de la historio de Kubo, ekde la praepoko ĝis la nuna tempo.

Prelegis la kubanino Mayra NUÑEZ HERNANDEZ. Ŝi menciis la malkovron de Ameriko en 1492 far Kristoforo KOLUMBO, kaj parolis pri la indiĝenoj tiam vivantaj sur la insulo.

Jen kelkaj gravaj historiaj datoj: 1-a etapo: 1868.10.10, Carlos Manuel DE CESPEDES liberigis siajn sklavojn. Samjare komenciĝis la 1-a milito kun Hispanujo. 1895-1898: lasta milito. José Martin

fondis la 1-an Revolucian Partion. 2-a etapo: 1902, Usono eniris oficiale en Kubon. Eksplodis milio en 1955, kiun gajnis Kubo la 1-an de januaro 1959. Ĝi tiel sukcesis resti sendependa lando. Per tiu ĉi evento komenciĝis la 3-a etapo, kies plej grava dato estas 1961.04.16, tiu de la Deklaracio de la socialisma Kubo.

La prelegon riĉigis intervenoj de Dieter ROOKE kaj ANJO. Dum la sabata distra vespero ni aŭskultis tradician kuban muzikon.

Malgraŭ tio, ke estis nur malmultaj partoprenantoj, la semajnfino estis bonsukcesa.

Anna LASZAY

SAEF

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj
Gertrud EGGENBERGER, Wurmühlstr. 10
8405 Winterthur ☎ 052 233 47 64
gertrud.eggenberger@bluewin.ch

Gratulon al Ernst GLÄTTLI

En 2001 la esperanto-fervojistoj kongresis en Ĉeĥio. 172 delegitoj el 18 landoj partoprenis la 53-an Kongreson de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFE) de la 12-a ĝis la 19-a de majo 2001 en la belege situanta sud-bohemia urbo Tábor.

Dank'al nia komuna lingvo
agrabla atmosfero estiĝis tuj
inter la gekongresanoj.

Svisan Asocion de Esperanto-
Fervojistoj (SAEF) reprezentis
4-kapa delegacio, kiu ĝuis ne
nur la kongresan etoson en
Tábor, sed ankaŭ la komunan
trajnveturadon tien kaj reen,
kun po unu tago de interrompo
en la bela ĉefurbo Praha.

La alternriĉa kongreso fariĝis
neforgesebla okazaĵo. Krom la
solena malfermo pliaj kulminoj
estis sendube la fakprelegoj pri
fervojoj aktualaĵoj kaj la
muzika vespero en la urba
teatro, dum kies unua parto la
komponistino, pianistino kaj
kantistino en unu sola persono,
sinjorino Elena PUCHOVA,
prezentis serenajn ariojn kant-
itajn senescepte en esperanto.
Dum la dua parto entuziasmigis
la aŭskultantojn la koncertkant-
istino Kateřina KUDLIKOVA kaj
la solkantisto Miroslav SMYCKA
per senmortaj melodioj el
verkoj de mondfamaj kompon-
istoj, kiel F. LEHAR, J.
STRAUSS, E. KÜNNEKE kaj aliaj.
Ĉiujn tekstojn esperantigis
Joachim GIESSNER, la honora
prezidanto de IFEF.

Dum la inaŭgura solenaĵo
estis nomumitaj tri novaj
honoraj membroj de IFEF,
nome la multjaraj kunlaborantoj
en la fervojista esperanto-mov-
ado Dieter HARTIG (Germanio,
Henning HAUGE (Danio) kaj
Ernst GLÄTTLI (Svislando).

La venonta IFEF-kongreso
okazos de la 1-a ĝis la 7-a de
junio en la bulgara urbo
Plovdiv. Ankaŭ nefervojistoj
estas kore bonvenaj!

Ernst GLÄTTLI

Eĉ se vi ne estas profesie fervoj-
isto, sed nur vojaĝemulo feri-
kapabla ekster la amasferioj, kial
ne aliĝi al la venonta IFEF-
kongreso kaj veturi al ĝi karavane
sub la gvido de la svisaj SAEF-
partoprenantoj! Vi certe ne
bedaŭros.

Claude GACOND

Senpaga servo por SES-anoj

Je via dispono TV- kaj radioprogramoj:
Aŭskultu sonbendojn, spektu vid-
bendojn. Profitu por via ĝuo de laboro
jam farita por vi. Levu vian lingvo-
nivelon senpene.

Kontaktadreso: Dieter ROOKE, Äussere
Klus 14, 4702 Oensingen.

UEA

Universala Esperanto-Asocio
Svisa delegitino: Sonja BRUN
Waldeggstrasse 28, 6343 Rotkreuz.
☎ 041 790 46 40.
e-majlo: smb Brun@freesurf.ch

Renkonto kun Renato CORSETTI

Renato CORSETTI, la prezidanto de UEA, vizitos nin en junio. Nepre rezervu la sabaton 15-an de junio por konatiĝi kun li kaj aŭdi lin okaze de kultura sabato okazonta en la Biblioteko de La Chaux-de-Fonds. La detalan programon de tiu ĉi renkonto ni aperigos en venonta numero de "SES informas".

Claude GACOND

Kvinpetalo Kurprogramo

Febuare 19-23: Praktikado de esperanto, 2-a nivelo, por infanoj kaj plenkreskuloj, kun Josée LAFOSSE.

Marte 25-29: Praktikado de la lingvo (1-a kaj 2-a niveloj) gvidata

de Nora CARAGEA kaj Suzanne BOUROT.

Aprile 19-25: "Baza legolisto" de William AULD. Enkonduko al la baza literaturo, kun Ed. BORSBOOM.

Aprile 29 – majo 3: Botaniko, kun Ru BOSSONG kaj Philippe PELLICIER.

Majo 8-12: Piedmigrado kun Monique DUSSENTY kaj Thérèse PINET.

Junie 18-22: Altnivela lingvo-kurso kun muziko kun Terry PAGE.

Julie 9-16: Leviĝas la kurteno, aktorarto kaj aktorado kun Paul GUBBINS kaj Colin SIMMONDS kaj samtempe: Inicado kaj praktiko de jogo kun Arlette PLUTNIAK.

19-23: Preparado al Altaj Studoj kun Janine DUMOULIN kaj Georges LAGRANGE.

Petu la detalan informilon kun la tarifoj al: Esperanto-Centro Kvinpetalo, Rue du Lavoir, FR-86410 Bouresse. ☎ +33 (0) 5.49.42.80.74.
kvinpetalo@club-internet.fr

La esperanto-studemulojn ni instigas konatiĝi kun la agrabla etoso reganta ĉe Kvinpetalo en Bouresse.

Claude GACOND

Loka aktiveco

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel

☎ 0049 76 214 57 12

Kunvenoj: 20h00 en Salono ĉe
Haltingerstrasse 97

Venontaj kunvenoj

Januare 31 20h: Ĝenerala
jarkunveno.

Februare 19 19h30: Gässle
al la karnavalo. Trefpunkto sub la
arkadoj de la "Kunstmuseum".

28 19h00: Rakledo ĉe Hans-
Peter SENN, sinanonco ĝis la 26-a
de februaro.

Marte 21 20h: Ludvespero
"Scrabble".

Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

☎ 022 740 04 45

Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon
de la monato je la 20h00 en la restoracio
«Aux Cheminots», 7, rue des gares, Genève.

Venontaj kunvenoj

2002 Februare 5

Marte 5: Ĝenerala jarkunveno.

Aprile 3.

Maje 7.

Junie 4.

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale : 389, 1009 PULLY

☎: (021) 729 58 02

<lausanne.ch @ esperanto.nu>

<<http://www.esperanto.ch>>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun
unuan lundon de la monato je la 20h00

Diskuta rondo: ĉiulunde ekde la 19h30 ĝis
la 21h00 ĉe François RANDIN, Vallombreuse
14, kiam ne okazas kunveno en la staci-
domo.

Raporto

La januara numero de la pli kaj pli
belaspekta "Informilo" de Laŭzana
Esperanto-Societo vigle raportas per
abundo da fotoj pri la zamenhofa
festo okazinta la 16-an de decembro
en plaĉe ornamita salono de la
restoracio Delta en Pully. Ridoj,
ludoj kun premioj, akordiona

muziko, danco kaj bankedo karakterizis tiun kunvenon.

Venontaj kunvenoj

2002 Januare 7: Kun Yvette GOY: krucvortoj kaj krucvort-enigmoj.

Februare 4: Ĉiuj al la Ĝenerala Asembleo.

Marte 4: Kun Charlotte BLANC: Sankta Jakobo de Kompostelo.

Aprile 8: Gramatikumado.

Maje 6: Rendevuo kun Karolo PICH kun Nancy FONTANNAZ.

Laŭzana Universitato

Menciindas la programo de seminario dediĉita al la artefaritaj lingvoj:

En ĝia unua kunveno, kiu okazis la 28-an de novembro en la Universitato de Lausanne, la slavisto Patrick SERIOT, kiu estas la organizanto de la seminario, raportis pri la uzo de esperanto en Sovetio: *"La problématique de la langue universelle des travailleurs en URSS dans les années 1920-1930 (L'espéranto prolétarien)."*

Profesoro Patrick SERIOT decidis organizi la duan kunvenon la 9-an de januaro en la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds, petante al Claude GACOND vizitigi CDELI-n kaj klarigi la kaŭzon de ĝia ekzisto

en la koncerna urbo. Kaj la profesoro Dan SAVATOVSKY (Paris) prelegis pri *"Les problèmes linguistiques posés par la question des langues artificielles (perspective historique)."*

Li restis plian tagon en La Chaux-de-Fonds por konsulti la sliparojn de CDELI kaj li malavare donacis la libregon *"Dictionnaire des langues imaginaires"* de Paolo ALBANI & Berlinghiero BUON-ARROTI, sur kies paĝo 56-a estas menciita CDELI en rubriko *"Langue auxiliaire internationale"*.

Jen la antaŭviditaj sekvaj konferencoj:

9-10 février Crêt-Bérard: S. KUZNECOV (Moscou): *"René DE SAUSSURE, une alternative explicite au structuralisme de Ferdinand."*
A. DULICHENKO (Tartu): *"Jakob LINZBACH, le LEIBNIZ estonien des années 1910"*.

13 mars Genève: R. AMACKER: *"Le projet analogique"*.

10 avril Berne: (Rapport collectif): *"Les projets philosophiques et logiques de langues artificielles du point de vue des linguistes."*

15 mai Lausanne: I. IVANOVA (Lausanne): *"Baudoin DE COURTENAY et les langues artificielles."*

29-30 juin Genève: *"Colloque de clôture"*.

Por interesatoj al la venontaj prelegoj jen la kontaktadreso:

Prof. Patrick SERIOT, Section de langues slaves, Faculté des Lettres, Université de Lausanne, BFSH2, 1015 Lausanne. Lia retadreso estas: Patrick.Seriot@slav.unil.ch

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke
☎ 041 280 46 12.

Ĉiuj kunvenoj, kiam lok-indiko mankas, okazas ĉe la hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstrasse 8, 6020 Emmenbrücke, tute proksime de Seetalplatz, facile atingebla per la trolebuso n-ro 2 kaj la fervojo. (De norde eblas veni aŭtobuse de Beromünster-Rothenburg, Ettiswil-Ruswil kaj de Neuenkirch.

La unuan merkredon de ĉiu monato - krom aŭgusto kaj oktobro - okazas paroliga kunveno de la 14h00 ĝis la 16h00 kun Franz Brügger en la restoracio Simplon, Habsburgerstrasse 14, Luzern.

Pripensiga Zamenhofa Festo

Merkrede la 5-an de decembro, sidantaj ĉirkaŭ bele ornamita tablo prizorgita de Rosa METTLER, la anoj de Lucerna Esperanto-Societo festis la zamenhofan tagon. 9 partoprenantoj havis la plezuron aŭdi ion nekutiman el la vivo de L. L. ZAMENHOF: Franz BRÜGGER laŭlegis tradukon de parolado de prof. Richard SCHULTZE, donitan en decembro 1976 antaŭ germanaj infanoj kaj ties gepatroj. Ĝi portis la titolon: *"Nano kaj Giganto"* kaj

temis pri la juna Ludoviko. En facila lingvo ni aŭdis pri la cirkonstancoj kaj eventoj, kiuj inspiris lin al la kreo de internacia lingvo: specife pri la kvereloj inter la gentoj en lia hejmurbo kaj la problemoj pri paco kaj pacemo, pri kiuj lia patrino instruis lin.

Okaze de la 100-jara datreveno de la eldono de la verketo *"Hilelismo – projekto pri solvo de la hebrea demando"* sekvis skizo de Sonja BRUN pri la temo *'De hilelismo al homaranismo'*. Ŝi klarigis pri la esenco kaj celo de hilelismo bazita sur la instruo de HILLEL, hebrea rabeno, kiu donis al ni nur unu leĝon: *"Traktu la aliajn, kiel vi volas, ke ili traktu vin. La cetero de la religio estas nur "kutimoj", kreitaĵ de la homo mem kaj kiujn oni rajtas sed ne devas praktiki.*

